

**KIMURA Goro Christoph**  
*Sophia University Tokyo, Japanio / Japan*

## **Recenzo de la libro**

**Grin, François, Manuel Célio Conceição, Peter A. Kraus, László Marác, Žaneta Ozoliņa, Nike K. Pokorn kaj Anthony Pym, red. 2018. *The MIME Vademecum. Mobility and Inclusion in Multilingual Europe*. s.l.: MIME Project**

MIME (Mobileco kaj inkluzivigo en multlingva Eŭropo) estis granda esplorprojekto financita de la Eŭropa Komisiono. Dum ĝia kvarjara projektdaŭro (2014-2018) ĉirkaŭ 70 esploristoj el 11 diversaj akademias esplorkampoj laborantaj en 22 institucioj en 16 landoj kunlaboris por evoluigi lingvopolitikajn strategiojn, kiuj taŭge balancu inter la du bazaj defioj de eŭropa integriĝo, inter kiuj ofte necesas trovi kompromison : “mobileco” kaj “inkluzivigo”. Kiamaniere parolantoj/uzantoj de naciaj lingvoj, lingvoj de malplimultaj popoloj kaj lingvoj de enmigrintoj povas harmonie kunvivi, ne izoligante sin disde la aliaj kaj tamen tenante sian identecon? La projekto celis kunmeti kaj analizi la kutime dise diskutatajn diversajn aspektojn de lingvopolitiko por doni orientiĝon al administrado de lingva diverseco en Eŭropo.

La recenzita manlibro koncize prezentas la ĉefajn rezultojn de la projekto. La eldonaĵo intencas doni al decidantoj kaj praktikantoj de lingvopolitiko sur diversaj niveloj helpon por plani kaj realigi politikon en la koncernaj agadkuntekstoj.

La strukturo de la libro jenas. Post prezento de la projekto kaj de ĝiaj bazaj rezultoj, kiuj emfazas la neceson kaj eblecon de kohera lingvopolitiko, sekvas respondaj tekstoj al 72 demandoj pri multilingveco. La respondaj tekstoj, arigitaj en ses grupoj, havas la saman strukturon konsistantan el kvin partoj: unue la signifo de la demando estas klarigita, due la aktuala akademia scikono pri tiu temo estas resumita surbaze de antaŭaj kaj MIME-aj esploroj. Trie faktoj aŭ ekzemploj estas prezentitaj por pli bona kompreno. Kvare proponitaj estas ideoj helpaj por politikaj decidoj. Fine troviĝas bibliografiaj informoj pri rilataj publikaĵoj por plia okupiĝo pri la demando.

En tiu ĉi recenzo ne eblas prezenti ĉiujn demandojn pritrakitajn en la libro. Do, unue ni trarigardu la ses gruptemojn kaj poste pli detale elprenu

demandojn, kiuj povus esti aparte interesaj por esperantologoj kaj interlingvistoj.

La unua grupo “politikanalizo” (demandoj 1-13) okupiĝas pri bazaj demandoj de lingvopolitiko kiel publika politiko. Legantoj informiĝas pri metodoj de politikanalizo kaj pri principoj de lingvopolitikaj decidoj laŭ politika, socia, eduka, ekonomia kaj leĝa aspektoj. La dua grupo “malplimulto, plimulto kaj lingvaj rajtoj” (demandoj 14-25) temas pri defioj por kunvivado de lingva plimulto kaj malplimulto. Oni povas konstati la nunan staton de la evoluo de lingvaj rajtoj. La tria grupo “lingva diverseco, mobileco kaj integriĝo” (demandoj 26-40) enhavas demandojn pri pliiĝo de kompleksa multlingveco kun tradicie ekzistantaj kaj novaj lingvoj en la sama teritorio. “Lingva edukado, instruado kaj lernado” estas la temo de la kvara grupo (demandoj 41-53). La kvina grupo, titolita “tradukado, lingvaj teknologioj kaj alternativaj strategioj” (demandoj 54-64), pridiskutas diversajn strategiojn de interlingva komunikado. Malmulte esplorataj “Specialaj temoj” (demandoj 65-72) konsistigas la sesan grupon, i. a. tiaj rilataj al multlingveco en ekonomiaj aktivecoj kaj homaj moviĝoj. Aparte aktuala temo pro atako de rusa armeo en Ukrainio iĝis la demando 68 “Kiel la manipulado de etnaj kreaĵoj povas esti evititaj?” Precipe fokusante al ruslingvanoj en la Eŭropa Unio, la teksto substrekas la gravecon de kapablo al kritika inform-alproprigo kontraŭ misinformado, gravega defio en la hodiaŭa mondo sendepende de lingva fono.

Inter la esploristoj, kiuj verkis la tekstojn, troviĝas konataj esperantologoj kaj esperanto-parolantoj kiel ekzemple Cyril Brosch, Sabine Fiedler, Michele Gazzola, Bengt-Arne Wickström kaj la ĉefredaktanto François Grin mem. Tial ne mirindas, ke la publikaĵo enhavas multajn aspektojn interesajn por esplorantoj kaj praktikantoj de la planlingvo. Por tiuj legantoj, tiu ĉi manlibro povas esti aparte utila por kompreni la socian, teknikan kaj lingvopolitikan medion en kiu Esperanto troviĝas kaj por lokigi la fenomenon Esperanto en pli vastan kuntekston de interlingvaj strategioj.

Diversaj tekstoj en la manlibro ripete montras, ke male al la ofta aserto kaj publika imago, la sola uzo de la angla en interlingva komunikado estas nek reala nek sufiĉa nek ideala nek antaŭvidebla (ekz. demandoj 7, 21, 30, 37, 53, 60). Ankaŭ la rekonceptigo de la angla kiel ne etne bazita ELF (*English as a Lingua Franca*; la angla kiel lingvafrankao) estas kritikata, ĉar tio ne senigas la maljustecon (demando 59). Tiuj esplorrezultoj, kune kun la teoriaj principoj prezentitaj en la libro, ŝajnas subteni la longjarajn pledojn de esperantistoj por pli justa kaj efika lingvopolitiko.

Sed el tiu ĉi konstato ne sekvas la konkludo, ke Esperanto simple anstataŭigu la anglan kiel internacia lingvo kaj la problemoj estos solvitaj. Tion klare montras la baza teksto pri interlingvaj strategioj (demando 35 “Kial ni

kombinu diversajn komunikajn strategiojn?”, László Marácz), kiu atentigas ne nur pri problemoj uzi etne bazitajn lingvojn kiel la anglan kiel komunan lingvon, sed ankaŭ emfazas la komplementecon de diversaj strategioj. Kiel tiajn strategiojn ĝi mencias lernadon de fremdaj lingvoj (uzon de la lingvo de la partnero), tradukadon, interkomprenan multlingvecon (*lingua receptiva*), interkompreniĝon inter rilataj lingvoj kaj ankaŭ alternativajn komunajn lingvojn kiel planlingvoj (ekz. Esperanto) aŭ klasikajn lingvojn kiel la latinan. Ĉiuj tiuj strategioj krom la uzo de la latina estas pritraktitaj en unu aŭ pluraj tekstoj en la manlibro.

Aparte emfazita estas la lernado de fremdaj lingvoj (demandoj 36, 38, 39 kaj la tekstoj en la kvara grupo 41-53). Tradukado, inkluzive de novaj eblecoj de maŝintradukado, estas la due ofte pritraktita strategio (30, 31, 54, 56, 58, 62, 63, 64). Ankaŭ la rilato inter tiuj ĉefaj krom-anglaj strategioj estas komplementaj. La esplorrezultoj kadre de MIME montras, ke plia uzo de tradukado ne malpliigas la neceson lerni fremdajn lingvojn. Tradukado ne povas esti perfekta kaj homoj volas rekte interkomuniki.

La utileco de trejnado kaj uzo de ricevaj kapabloj estas ripete emfazita en diversaj tekstoj (15, 45, 52, 55, 61). Ofte eblas legi tekston aŭ kompreni elparolon en lingvo, kiun oni mem ne (sufiĉe) bone regas. Esploristoj trovis komunikadon uzante tiajn ricevajn kapablojn en diversaj ne-formalaj situacioj, sed konstatas, ke la eblecoj de tiaj strategioj ankoraŭ ne estas konscie evoluigitaj en lingvolernado kaj utiligataj en la socio.

Al la strategioj ne sufiĉe politike kaj socie agnoskitaj apartenas ankaŭ Esperanto. Responde al la demando “Ĉu planlingvoj kiel Esperanto estu promociitaj kiel internacia lingvafrankao?” (demando 57), Fiedler kaj Brosch argumentas, ke ĝia relativa lernfacileco kontribuas al mobileco kaj integriĝo. Ilia esploro montras, ke la uzo de Esperanto ne ekskludas aliajn lingvojn kaj ke la propedeŭtika efiko eĉ helpas lerni aliajn lingvojn. Tiel, Esperanto bone akordiĝas kiel valora ero en la interlingva strategiaro. Ili proponas, ke edukaj sistemoj serioze rekonsideru la kontribueblecon de tiu ĉi planlingvo en interlingva komunikado. El vidpunkto de esperantologio oni povus bedaŭri, ke malgraŭ ĝia diversa aplikhistorio kaj -ebleco nur unu teksto pritraktas Esperanton. La fakto tamen, ke tiu teksto ne troviĝas en la grupo de “specialaj temoj”, sed estas integrita en la grupo pri interlingvaj strategioj, jam estas sufiĉe bona kaj salutinda atingo. La enhavo mem ne estas nova por esperantologoj, sed ĉiam denove indas montri la kontribueblecon de Esperanto al eksteruloj surbaze de konkretaj esploroj.

Kvankam skribita por praktikantoj, la manlibro, kiu montras la nunan staton de esploro pri lingvopolitiko en facile alirebla formo, estas utila ankaŭ por esplorantoj de lingvopolitiko kaj aliaj interesitoj pri lingvaj demandoj en la socio. Ĝi bone taŭgas kiel bazo por diskuto pri diversaj lingvopolitikaj temoj. Mi uzis ĝin en mia lingvosociologia seminario por postdiplomaj

studentoj ĉe Sophia-universitato en Tokio. Parto kvar, kiu prezentas ideojn pri pli bona multlingva edukado kaj universitata lingvopolitiko, estas pensiga kaj inspira por edukistoj kaj universitatoj. Por esperantologoj, aparte la kvina grupo pri interlingvaj strategioj estas rekomendinda legaĵo por vastigi la horizonton. Kvankam la strategioj ne estas sisteme prezentitaj kaj la aspektoj priskribitaj en la projekto spegulas la interesojn de la esploristoj en la projekto<sup>1</sup>, feliĉe por esperantologoj, Esperanto apartenas al la pritraktitaj strategioj.

El vidpunkto de praktika utileco estus utile havi liston (indekson) de ŝlosilaj kaj sciindaj fakterminoj, kiuj ne videblas en la titoloj de la tekstoj sed ripete aperas en la tekstoj – el esperanta vidpunkto menciendas ekzemple “lingva justeco” (*linguistic justice*) kaj “propedeŭtika efiko” (*propedeutic effect*). Tia listo helpus ankaŭ por unuecigi la signifon de la fakvortoj aŭ almenaŭ atentigi pri malsamsignifaj uzoj. Ekzemple, “interkompreniĝo” (*intercomprehension*) estas uzata kiel subkategorio (demando 35) aŭ sinonimo (demando 55) de riceva multlingveco.

La limigita longeco de la tekstoj ne permesas profundan diskuton de la unuopaj temoj. Por legantoj, kiuj sentas tian bezonon, la projekto ofertas alian, pli ampleksan libron (Grin, Marácz, kaj Pokorn 2022).

## Bibliografio

Grin, François, László Marácz kaj Nike K. Pokorn, red. 2022. *Advances in Interdisciplinary Language Policy*. Amsterdam kaj Philadelphia: John Benjamins.

Kimura, Goro Christoph. 2019. “Interlinguale Strategien im Vergleich: allgemeine Eigenschaften und deutsch-polnische Anwendungen.” En *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 2019*, redaktis Cyril Robert Brosch kaj Sabine Fiedler, 43-57. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag.

## Pri la recenzanto

KIMURA Goro Christoph (nask. 1974), socilingvisto. Ekde 2012 profesoro pri germanaj kaj eŭropaj studoj ĉe la Fakultato por Fremdaj Lingvoj kaj Studoj de Sophia-Universitato en Tokio. Estis gastesploristo ĉe la Eŭropa Universitato Viadrina en Frankfurt/Oder (2012–2013) kaj ĉe la Universitato Leipzig (2021–2022). Esploras inter alie la rolon de lingvo en interpopolaj kaj internaciaj rilatoj.

Retadreso: g-kimura@sophia.ac.jp  
ORCID-numero: 0000-0002-2298-3648

1 Kimura (2019) ordigas ĉiujn teorie penseblajn interlingvajn strategiojn kaj prezentas iliajn bazajn trajtojn.

## **About the reviewer**

KIMURA Goro Christoph (born 1974), sociolinguist. Since 2012 professor of German and European studies at the Faculty of Foreign Studies, Sophia University in Tokyo. 2012–2013 guest researcher at the European University Viadrina in Frankfurt/Oder, 2021–2022 at Leipzig University. His research interests include the role of language in trans- and international relations.

## **Über den Rezensenten**

KIMURA Goro Christoph (geboren 1974), Soziolinguist. Seit 2012 Professor für Deutsche und Europäische Studien an der Fakultät für Auslandsstudien der Sophia-Universität in Tokyo. 2012–2013 Gastwissenschaftler an der Europa-Universität Viadrina in Frankfurt/Oder, 2021–2022 an der Universität Leipzig. Er forscht u. a. über die Rolle der Sprache in trans- und internationalen Beziehungen.